

Theodor Storm,

## La urbo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe l' griza strand', ĉe l' griza mar'  
Situas la urbeto;  
Nebulas sur la tegmentar',  
La monotona bru de l' mar'  
Aŭdiĝas tra l' kvieto.

Arbar' ne estas tie ĉi,  
Ne kantas bird' sen ĉeso;  
Anseroj nur, kun dura kri',  
Forflugas alte preter ĝi,  
Ĉe l' strando flirtas greso.

Sed pendas mia kor' de vi,  
Vi griza urb' ĉe-mara;  
De la juneco sorĉ-graci'  
Ridante kuŝas super vi,  
Vi griza urbo kara.

*Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-03.*

*Arg-173-346 (2004-02-22 12:54:29)*

Theodor Storm,

## La urbo (2a versio)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe l' griza strand', ĉe l' griza mar'  
Situas la urbet';  
Nebulas sur la tegmentar',  
La monotona bru de l' mar'  
Aŭdiĝas tra l' kviet'.

Arbar' ne estas tie ĉi,  
Ne kantas bird' sen ĉes';  
Anseroj nur, kun dura kri',  
Forflugas alte preter ĝi,  
Ĉe l' strando flirtas gres'.

Sed pendas mia kor' de vi,  
Vi griza urb' ĉe l' mar';  
De la juneco sorĉ-graci'  
Ridante kuŝas super vi,  
Vi griza urb' ĉe l' mar'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-173-348 (2004-02-22 14:30:28)*